Kiu faras tion? - Interkoniga ludo

**Celgrupo:**

Prefere ekde komencinta nivelo, sed komencantojn parigu kun aliaj, kiuj povas helpi interpreti, ja tiu ludo postulas la kapablon demandi ion simplan al alia persono. Se en la grupo, iuj estas komencantoj, parigu ilin kun alia persono, kiu povas helpi kaj traduki.

**Bezonataj aferoj**: aro da paperaj slipoj (du slipoj por ĉiu persono) kaj multaj skribiloj.

| **Paŝoj de la ludo** | **Konsiloj por la gvidado** |
| --- | --- |
| **Prepariĝo**<br><br>Disdonu la slipojn. Sur unu, ĉiu persono skribu interesan fakton pri si, kiun multaj homoj ne scias. | *Laŭ mia sperto, necesas doni ekzemplojn al la grupo:*<br><br>"Mi kreskigas 200 kilogramojn da tomatoj ĉiu-somere."<br>"Mi posedas pli ol kvincent librojn en Esperanto."<br>"Mi havas gefratojn, kiuj estas ĝemeloj."<br>"Mi iam vizitis Nepalon." "Mi ŝatas popoldanci."<br><br>*Donu al la homoj iom da tempo por tio.* |
| Post kiam ĉiuj sukcesas, petu ke sur la alia slipo, ili skribu ion, kiu NE estas vera por la skribanto, sed laŭ ilia supozo, eble estas vera por iu alia en la ĉambro. | *Kutime, indas emfazi ke la inventaĵoj estu kredeblaj, por bremsi la fantazion de iuj. Mi sugestas ke homoj NE skribu ion tre malverŝajnan, ekz.*<br><br>*"Mi havas 23 infanojn,"*<br>*"Mi perlaboras milionon da dolaroj jare."* |
| **Grupa interago** | |
| Skribinte la du slipojn, ĉiuj enĵetu ambaŭ slipojn en skatolon, aŭ similan ujon kaj poste ĉiu elprenu du slipojn (ne la proprajn), kaj provu trovi homojn, pri kiuj la frazoj sur la slipoj estas veraj. | *Se estas pli ol unu persono, pri kiu la slipo estas vera, des pli bone. Oni skribu sur la slipon la nomojn de ĉiuj homoj, pri kiu la aserto estas vera. Kompreneble, oni prezentu sin antaŭ ol demandi. Ekzemple*: |

*A: Saluton, mi estas Amanda*
*B: Mi estas Benito.*
*A: Ĉu vi ŝatas popoldanci?*
*B: Ne. Kaj ĉu vi iam vizitis Nepalon?*
*A: Fakte, jes. Antaŭ tri jaroj, mi vizitis Esperantistojn tie.*
*Ĉu vi posedas pli ol kvincent librojn en Esperanto?*
*B: Bedaŭrinde, ne. Ĉu vi iam posedis kvar biciklojn samtempe?*
*A: Jes, eĉ nun mi posedas kvin.*
*Dankon, Benito.*
*B: Dankon, Amanda.*

*Neniel gravas ĉu la demandata persono estis tiu, kiu skribis la slipon. Oni nur trovu kaj notu la nomojn de kiom eble plej multe da homoj, kiuj jesas al la diraĵoj sur la slipoj. Finu tiun fazon de la ludo laŭ via sento de la etoso. Ne gravas ĉu ĉiuj havis tempon demandi al ĉiuj aliaj. En granda grupo, tio postulas tre longan tempon. En malgranda grupo, kompleta interdemandado povas, sed ne devas, okazi.*

**Fina ago :**

Arigu la homojn en cirklon.
La unua persono legos unu el siaj slipoj, kaj la nomojn de la trovitaj homoj, pri kiuj la aserto veras.
Poste la gvidanto demandu ĉu ankaŭ veras por aliaj (ne-trovitaj) en la grupo. Agu same kun la dua slipo. Faru same por ĉiu en la grupo.

*Permesu, ke homoj aldonu klarigojn pri la plej interesaj frazoj. Por kelkaj el la malveraj slipoj, oni trovos neniun. Sed tre ofte, la inventaĵoj de iu estos veraj por alia.*

Post raportoj de ĉiuj, la ludo finiĝas.